-ĜENERALA-INFORMILO-

N-ro 61 NOVEMBRO 988

BARCELONA ESPERANTO - CENTRO

C/CARRERAS I CANDI 34
TELEFON:2.40.26.62.
08028-Barcelona
Katalunio,Hispanujo

JUNULARA SEKCIO BE-C

## EKSKURSO AL LA HISPANA ESPERANTO-MUZEO EN SANT PAU D'ORDAL

### 6an de Decembro

Organizita de la esperantistaro de Olesa de Montserrat kaj de Barcelono,sub la gvidado de samideano Javier Hernández.

Eliro el la stacidomo de SANTS je la 7,40 h.

Antaŭkonveno en la halo de la stacidomo je la 7,15 h.Oni petas akuratecon al la partoprenontoj.

Ni haltos en la stacidomo de LABERN-SUBIRATS kaj kune ekkursos ĝis San Pau D'Ordal,kie oni matenmanĝos.Je la 11a horo,komencos la viziton de la Muzeo kaj poste okazos kunvenon por interparoli.

Tagmeze la ekskursantoj tagmanĝos en la ĉirkaŭaĵoj de Sant Pau d'Ordal ,kaj revenos al la stacidomo de Labern-Subirats por reveni hejmen.Oni informas ke la trajnoj eliras de Labern-Subirats je la, 16,40 ,1848 kaj 20,38 h.

---

## D U A J.E.K.A.- F E S T O

La tagon 18an de Decembro je la 12a horo okazos la DUA JEKA-FESTO

La programo estos: Paroladoj de la JEKA-Delegitoj.Projekciado de diapozitivoj,interparoladoj .Prezentado de la lasta verko de la kolekto Hispana Literaturo, LA STULTAJ INFANOJ ( LOS NIÑOS TONTOS) de Ana Maria Matute.Lunĉo kaj trinkaĵoj donacitaj de JEKA kaj adiaŭon kaj bondezirojn por la nova jaro 1988.

---

## N A T U R A Ŝ A Ŭ V I N O
## E S P E R A N T O

**Prezo:** UNU BOTELO 450 pesetoj. Dek BOTELOJ 4.000 pesetoj

Je la dispono de ĉiu esperantistoj ekde la UNUA DE DECEMBRO

---

## A T E N T O N.ALVOKO AL LA ESPERANTISTOJ

La respondeculoj de la kolekto HISPANA LITERATURO,profitos la prezentadon de la verko LA STULTAJ INOFANOJ de Ana Maria Matute,por disdoni la du verkojn POETO DE L'POPOLO de M. Hernandez kaj LA STULTAJ INFANOJ al la gesamideanoj kiuj abonis al la lastaj kvar titoloj de la kolekto.Ke ili pagis 2200 pesetojn antaŭ tri jaroj, LLIBRERIA ESPERANTO okaze la festo disvendos la kvin titolojn de la kolekto po 3.000 pesetoj . La kolekto enhavas la jenajn titolojn:

LA FAMILIO DE PASCUAL DUARTE
ASTURA BUKEDO
SENTEMPA SIMFONIO
M.Hernandez POETO DE L'POPOLO
LA STULTAJ INFANOJ

---

## N O V A H.E.J.S. A D R E S O

La pasintan 16an de Oktobro la HEF-estraro kaj la delegitoj ratifikis kiel prezidanton de la Junulara Sekcio de HEF fraŭlon Jordi Ferré , Apartat 23484, E-08028 BARCELONO.

---

## K O T I Z O J

S-ro Josep Cosesa BEC-Sekretario,atentigas al la membroj kiuj ankoraŭ ne sendis siajn jarajn kotizojn ke dum la ekskurso aŭ dum la festo oni povos doni al la BEC-estraro siajn kotizojn kaj donacojn.

Antaŭdankojn.

---

BEC-ESTRARO DEZIRAS AL ĈIU ESPERANTISTO FELIĈAN NOVAN JARON 1989